

FEDERACIA KUNVENO en NARBONNE (la 25an de aprilo)

En kursivoj kompletigaj rimarkoj .

Partoprenas 18 personoj, senkulpiĝis 2 ; ŝajnas, ke dimanĉo ne vere konvenas por ĉiuj, do ni kunvenos sabate venontfoje . La prezidanto Jean Hénin (JH) bonvenigas ĉiujn ; ĉiu sin prezentas . Ni ĝojas revidi kelkajn gesamideanojn, inter kiuj Jean Amouroux (JA)(Perpignan) kaj Wilhelm Lutterman fine de la kunveno. La salono (« salono de geedziĝoj ») ne estas plej oportuna ; plurfoje perturbo nin muziko dum la kunveno pro karnavala festo . Tamen vizito nin persono interesita pri E (sekve de anonco en la gazetoj) kaj ĵurnalisto de « Midi Libre » . Ne estis facile aranĝi kunvenon en Narbonne, ĉar neniu surloke helpis . Espereble en 2005 ni kunvenos en urbo kun surloka esperantisto . Unue ni devas akordiĝi pri la horaro, pro malfrua tagmanĝo, kaj divido de la tago pro prezento de EDE fine de la kunveno .

Financa raporto : pozitiva . Sekve de la kongreso en Cap d'Agde ni ricevis parton de la profito . J A opinias, ke ni devus sisteme ĉiujare prezenti subvencipeton al la regiona konsilantaro, tiel memorigante pri nia ekzisto . JH opinias, ke ni devas rezervi tiajn dosierojn por gravaj eventoj . Pluraj mencias le eblecon de subvencipetoj ĉe municipoj, departementaj konsilanoj . La financa raporto estas unuanime akceptata .

JH koncize prezentas la agadraporton . Informoj regule aperas en SFS, « Okazas » aŭ « Le Monde de l'E^o » pri la agadoj de la grupoj aŭ de unuopuloj . Ni ĝojas pri novaj aktivaj membroj en Prades kaj Lunel, Christian Mouré legas raporteton pri la E^e-klubo en sia kolegio . Neniu vivosigno el Gard . Unuanima aprobo de la agadraporto . Ni ĝojis pri la vizito de Litovino (Grazina), ni decidis pri 200^e-helpo al la projekto de Flavio Rebelo ; partoprenintoj de la kongreso de Sat-Amikaro en La Roche sur Yon rapide raportas . Estas laŭvice menciataj prelego de « Attac » en Béziers pri Eŭropo; vizito de pola familio en majo; la simbola pliampleksiĝo de Eŭropa Unio kun pli akra lingvoproblemo; renkonto en Porta (P-O); manifestacio en Strasburgo (« Bunto »); nacia kongreso en La Roque d'Anthéron (reprezentos nin JH, Annick Tora, Ges. Bernard); staĝo en Vias (ĉi-jare pro la karambolo kun la nacia kongreso aliĝis ĝis nun nur 17), certe necesos trovi alian pli taŭgan lokon; renkonto de lingvoj en Decazeville (12) ; poŝtmarko pri 2005 : Mado Vidal ne ricevis respondojn de la alskribitaj asocioj – *tamen Sro Valet, prezidanto de la norda federacio, kiu organizas la kongreson de Boulogne sur Mer, konfirmis klopodon nome de la tri organizantaj asocioj ĉe la Poŝto-* JA opinias, ke estas tro malfrue por prezenti peton, tamen ni faros kaj Line Maurel/Mado Vidal kontaktos lokan respondeculon de la Poŝto, Francis Bernard opinias, ke ni devus peti subtenon de politikuloj – *dosiereto estis sendita al la Poŝto pri memoriga poŝtmarko ; venis respondo pri bona ricevo kaj promeso (?) pri konsidero de la peto ; biblioteko en Lunel-Viel : la afero progresas, Georges Gonthier kaj Christian Mouré listigas rete la librojn, la federacio donacos kelkajn librojn ; pri la eŭropa baloto estas proponata libreto de A. Cherpillod, la 20 ekzempleroj tuj vendiĝas ; komuna jarfina tago estas proponata la 19an de junio, la grupo de Béziers informos pri la loko ; « Esperanto-Infos » organizos sian jaran kunvenon en Lozère la 3an de julio ; renkonto de skoltoj en Aveyron : Mado Vidal informas pri internacia renkonto de gejunuloj (skoltoj) en julio kaj ateliero de plenkreskuloj en aŭgusto (kun prezento de E^o) ; Kongresoj de Pekino (UK) kaj Bilbao (Eŭrop-Unia) – iuj partoprenos la lastan ; Sète : ni ne forgesu tiun aranĝon en Aŭgusto en agrabla loko marborde (kontakti Yvette Vierne) .*

Koncerne federaciajn aferojn : a) pri la bulteno SFS, ĉiam estas problemoj pro nerespekto de la limdatoj . En 2005 du el la kvar numeroj estos pli dikaj, ni plialtigos la prezon je 1^e (7^e anstataŭ 6^e) b) retpaĝoj pri la federacio : Christian Pinard prizorgos la aferon . Por retuzantoj jam ekzistas la listo « Pireneoj » . c) informiloj-prospektoj : ni presigos 300 por la forumoj de asocioj en septembro, *fakte 400, ĉar intertempe aldoniĝis forumoj en Prades kaj Campagnan* . d) forumoj : en septembro sinsekve en Béziers, Montpellier kaj Lunel . La federacio pretas helpi aliloke (sin anonci anticipe) . e) rilatoj kun UFE : ni subskribis kontrakton, C. Pinard estas komitatano kaj JH reprezentas nian federacion . f) departementaj delegitoj : por pli bona organizado, priaktado de informpetoj aŭ interveno ĉe elektitoj... 11 : Colette Carbonnel, 30 : ?, 34 : Annick Tora + iu en Béziers, 48 : JH, 66 : Christian Pinard . g) komitato de UFE : neniu kandidato, JH klarigas, ke la fervojaj rilatoj malboniĝis h) Céret : kataluna kaj transpirena kongreso fine de oktobro . Pluraj intencas partopreni ; aliĝilo estos en la venonta SFS i) Vilnius . Inter Pekino kaj Florenco (2006), Litovio, nova membro de EU, invitas vin . JH proponas lui buson, veturi ekzemple tien en 4 tagoj kaj reveni same, vizitonte survoje diversajn landojn de « malnova kaj nova» eŭropo . Estus bona okazo praktiki esperanton dum 2 semajnoj entute kaj varbargumento (lernu esperanton en kelkaj monatoj, vizitu eŭropon kaj parolu al homoj de diversaj landoj). j) venontaj kunvenoj : aŭtune ni kunvenos kadre de la kongreso de Céret . *Fakte tiu solvo estis tro bela sed ne eblas ! Pro la forumoj de asocioj en septembro kaj renkontoj en oktobro (semajno en Salou, kongreso de Céret) ni kunvenos en Béziers -oficiala respondo atendata !-la 4an de septembro . Ĉar la grupanoj de Béziers kunvenos poste por prepari la forumojn de asocioj, nia kunveno finiĝos pli frue ol kutime* . Koncerne nian printempan kongreson, ĝi okazos **en 2005 en Lunel**, pri la dato ni decidis en septembro en Béziers . k) renovigo de la komitato : Francis Bernard, tro okupata pro « E-Infos », ne rekandidatas . Colette Carbonnel kaj Jean Hénin estas konfirmataj, Christian Mouré kaj Georges Santos estas elektitaj kiel novaj komitatanoj . l) renovigo de la estraro : nova skipo estas elektenda sed mankas kandidatoj ...Ni rediskutos la aferon ; dume funkcios la nuna skipo . Mankis tempo por la programero « argumenti », fakte la tagmanĝo forprenis pli da tempo ol supozite . Fine de nia kunveno, Thierry Saladin kaj pluraj listanoj prezentis la projekton EDE . Iuj ege favoras, aliaj ne favoras...

VIVO DE LA GRUPOJ :

BEZIERS :

Printempa staĝo de CBE en Vias (de la 19a ĝis la 26a de majo 2004)

Kiel jam de 21 jaroj, la CBE (Cercle Biterrois d'Espéranto) organizis sian staĝon . 27 esperantistoj kuniĝis en « La Dragonnière » proksime de Béziers kaj de Vias . Ĉiu elektis inter 5 niveloj la kurson, kiu plej taŭgis . Gvidis la komencantojn Josée Boccadifuoco (jus diplomita de la pedagogia parto de la Kapableco), Georges Gonthier kaj Guy Carquet, do tri novbakitaj gvidantoj . Prizorgis la konversacian rondon Josée Lafosse kaj respondecis pri la altnivela grupo Sro Salvador Aragaj el Barcelono . Tiuj gvidantoj alportis al siaj gelernantoj multe da konoj kaj eĉ vigligis la konversacion dum la manĝoj . Ĉiuj aprecis la dinamismon kaj la valoron de la kursoj tiamaniere, ili foje forgesis la paŭzetojn . Pluraj kandidatiĝis por la unuagrada ekzameno kaj eĉ la kapableco . La viglaj kaj la variaj vesperoj agrable sekvis la labortagojn : lotoludo, filmoj, teatraĵoj, debato, ludoj kaj kantoj . La servistaro estis tre afabla, la manĝo bona, la loĝado komforta . La vetero permesis profiti plene de la restado . Verda flago, kiun ni mendis speciale ĉe fabrikanto, bele realigita, flirtis fiere kun tiuj de eŭropaj landoj . Dum la libera duontago kelkaj vizitis "la Maire", naturan lokon apud la maro, aliaj iris al la « Oppidum de Ensérune » . Tie ili malkovris esperantistan junulinon, kiu deĵoras ĉiun lundon en la muzeo mem . Tiu fakto meritas nian atenton ; estus bone, ke oni faru same en aliaj turismaj lokoj .

Raportis Line kaj Mado

*La CBE dankas ĉiujn gvidintojn de kursoj, kiuj sindoneme zorgis pri siaj gelernantoj . Ĝi ankaŭ dankas Jean-Pierre kaj Christian, kiuj bone organizis kaj okupiĝis pri la tiklaj aferetoj dum la staĝo kaj vesperoj . Ni intencas organizi novan staĝon **de la 18a ĝis la 25a de majo 2005** . Tiam estos nek festoj (Ĉieliro, Pentekosto), nek kongreso, do ni kalkulas akcepti multajn hopojn . La estro de « La Dragonnière » promesis al ni aliajn dometojn en tre trankvila loko . Pliaj informoj en la venontaj SFS .*

Post la staĝo aperis « La kulisklaĉulo », « serioza kaj klaĉa gazeto » kun « ĉio, kion oni ne diris al vi kaj laŭte krias »... La redaktejo estas ĉe « eksterterana CBE ateliero » kaj la redaktoro Jipe . Oni ekzemple ekscias pri la « noktoj perturbitaj per la bruegoj de motorciklistoj, venintaj de Isère kaj Savojo, ĉiuj vestitaj de nigraj ledaj vestoj . Strangajn maŝinojn ili rajdis kaj multe similis al « skinheads » . Ili ĉefe vivis dumnokte, trinkante bieron kaj laŭtparolante ĝis la ektaĝiĝo Oni ja bezonas ĉion por fari mondon !



Kalendaro por la jaro 2004/2005 (sekve de la kunveno de la 12a de junio)

Ĉar la domo de asocioj (MVA) petis niajn datojn por la venontaj monatoj antaŭ la fino de junio, jen ili
4a de septembro : preparo de la forumo de asocioj de la 11a de septembro . En la mateno okazos kunveno de la federacio ; tiu kunveno ne povos okazi dum la kataluna kongreso fine de oktobro . Pri fina decido de la MVA por tiu mateno ni devas atendi ĝis la fino de julio . Espereble ne multaj aliaj asocioj petos tiun daton .

11a de septembro : Aleoj de la Asocioj

25a de septembro : Rezulto de la « Aleoj » kaj preparado de la kursoj

16a de oktobro : Monata kunveno . Guy Carquet prezentos debaton pri « Etiko de Eto »

13a de novembro : Monata kunveno

11a de decembro : Zamenhofa festo

Kaj en 2005, la monataj kunvenoj okazos la 8an de januaro, la 12an de februaro, la 12an de marto, la 10an de aprilo, la 12an de majo kaj la 11an de junio ; la staĝo en Vias disvolviĝos de la 28a ĝis la 25a de majo .

Esperantista piknika tago (sabato, la 19a de junio 2004)

Dum la printempa varmeĉo de tiuj lastaj tagoj, ni pensis, ke la arboj de la parko « La Plantade » ŝirmus nin kontraŭ la suno dum la piknika tago. Fakte ili ŝirmis nin...kontraŭ la pluvo !

Apud la ĝardeno, sur la rando de la rivero Orb, fronte al la muelilo Cordier, ni kunportis tablojn, brakseĝojn kaj manĝaĵojn. Malgraŭ malĝojiga vetero, la etoso senŝanĝe estis bona kaj ĝi restis tia ĝis la fino.

La robinioj unue ofertis leĝeran, agrablan ombron sed la diafana foliaro ne sufiĉe gardis nin kontraŭ la gutoj kaj ni translokiĝis sub la fagojn. Tie, ŝirmite de foliriĉa kupolo, 14 esperantistoj, venintaj el Béziers kaj Campagnan, troviĝis por la tradicia kampara jarmanĝo.

La aperitivoj ĝuigis la korojn. La juglandvino de Christian estis speciale taksata kun kukoj, aperitivkukoj, melonoj, picoj, ĉerizoj. Ni pensis sati. Tamen, ĉiuj eltirinte siajn sandviĉojn el la korbo, atakis kun bona apetito la manĝon. Ĝi finiĝis per kafo regalita, kun ĉokolado, de bone inspiritaj esperantistoj.

Baldaŭ dolĉa muziko provizore interrompis la paroladojn, kaj Geneviève delectis nin per interpretado de porflutaj barokmuzikoj. Pluvo falis, gutojn post gutoj, sur la folioj supre de niaj kapoj, la rivero flustris apud ni. Tiuj delikataj sonoj enmiksiĝis, kreis kvietigan etoson en harmonio kun esperantista paco. Tamen tio ne estis la dormemo.

Line rakontis la historion de «La Plantade» kun ridigaj gazeteltiraĵoj de la epoko, kiam la soldatoj ne devis sin bani apud la lavistinoj kaj geuloj ne devis ambigue promenadi laŭlonge de la rivero.


Poste ni parolis pri peticio pri poresperanta agado. Naskiĝis vigla diskuto: ĉu ni precizigu frazon, kiu postulas por eŭropo neŭtralan, nehegemonian lingvon per « tiu lingvo ekzistas: esperanto »?, ĉu ni nin detenu sen elparoli tiun vorton ne permesitan « esperanto »? Ĉu ni hontas pri esperanto? La eŭropa baloto konigis ĝin sur la ondoj, ni profitu tiun okazon sen modereco. Timideco, rezervo ne plu estos ekstermodaj! Pluvo martelis la ondon de la rivero, vetero malvarmetiĝis. Plejdoj, anorakoj kovris niajn ŝultrojn.

Bedaŭrinde necesis reiri al niaj aŭtoj. Ĉiuj estimis tiujn tempopunktojn de pli abunda kunvivado kaj kontrastante kun la malkvieta vivo de ĉiutago.

Mado

NDLR: pri la utilo de tuja mencio de esperanto en peticio respondecas la raportintino.

Espereble en 2005 eblos anonci frue la junian piknikon, tiel ebligonte al pli da esperantistoj partopreni.



Prezento de esperanto en Campagnan:

Komence de julio, laŭ la peto de la loka urbestro, esperanto estis prezentita kadre de semajnfino pri « Arts et loisirs ». Gilbert Santos kaj Marie-Thérèse Lemaire preparis belan budon kaj diversajn dokumentojn. Apudaj esperantistoj, speciale de la grupo de Béziers, helpis por respondi al la multaj demandoj de la vizitantoj. Estas antaŭvidata kurso en septembro kaj partopreno en forumo de asocio en apuda vilaĝo, eble ankaŭ en Clermont-l'Hérault. Ŝajne oni pli bone rimarkas poresperantan budon en vilaĝo ol en urbeĝo kun centoj da budoj! Gratulojn al la iniciitantintoj!

Prelego ĉe Attac:

La 30an de aprilo Attac organizis prelegon pri la eŭropa konstitucio. Antaŭ tiu dato T. Saladin sendis kontribuon pri la lingva problemo en Eŭropo, kiu aperis en « Résistances », la bulteneto de la loka asocio Attac. Notinde, ke la vorto esperanto ne estis menciita en la artikolo sed estis aldonita kontaktadreso de la loka E %grupo.

Dum la kunveno estis elvokita la lingva problemo, kiu malhelpas la konstruon de vera eŭropa unio. T. Saladin intervenis, proponante la enkondukon de esperanto en la lernejojn. Du partoprenantoj esprimis rezervojn sed konfesis poste, ke ili havas nenion kontraŭ esperanto.

Lingva koŝmaro

« Cauchemar linguistique »: interesa artikolo pri la pliampleksiĝo de EU aperinta en « Midi Libre » la 28an de aprilo. CBE skribis al la gazeto, aprobante la analizon de la problemo sed mirante pri la konkludo, kiu ignoris la ekziston de solvo per esperanto.

LOZERE

Generala kunveno de « Esperanto Info »

Ĝi kunigis la 3an de julio en Coperlac dudekon da personoj, ne nur de nia regiono sed ankaŭ de aliaj regionoj kaj eĉ de Belgio. Bela vetero kaj amika etoso. Nova skipo estis elektita por daŭrigi « E°-Info », kiu daŭre progresas kaj fariĝas pli kaj pli belaspekta kaj interesa. La revuo estas en la franca kaj informas pri esperanto kaj la lingvo-problemo. Ekzemplero estas petebla de Francis Bernard, la redaktoro, adreso: Les Bories de Coperlac 48210 Mas St Chély, Tel: 04 66 48 58 48

Filinoj:

Céline Bernard, la filino de Francis kaj Monique B., estis elektita prezidantino de la E°-federacio de Provenco. Gratulojn! Eble iam niaj federacioj povos denove kunlabori.

Brigitte Hénin, la filino de Alma kaj Jean H., estis intervjuita kaj filmita de FR3 kun aliaj organizintoj de la kongreso de la rodanalpa federacio en St Martin d'Hères (Grenoble). En septembro Brigitte gvidos E°-kurson.

MONTPELLIER

Lastaj kunvenoj . La 18an de majo kunvenis 16 esperantistoj . Annick Tora informis pri la ricevo de la urbestra subvencio, ankaŭ pri la interesa kunveno en Narbonne, kiun partoprenis 4 grupanoj . Nia kultura centro ĝoje akceptis du novbakitajn esperantistinojn, Joëlle kaj Odette Tarchini . Bonvenon al ili ! Josée Boccadifuoco, kiu partoprenis en Bouresse staĝon pri Zamenhof, sin proponas por esti la instruistino de la du novaj samideaninoj . JB sukcesis la pedagogian parton de la Kapableco, ni gratulas ŝin . Rosa Aumeunier ĉesos instrui en UTT ekde septembro, espereble iu anstataŭos ŝin .

En Lunel-Viel la biblioteko ricevis diversajn librojn . André Capus informas pri la libro-kolekto de Sro Diez, kies filo prizorgos la disdonon de la E -libroj, laŭ la volo de sia patro .

Ni diskutis pri artikoloj aperintaj en « Midi Libre ».

Ni gratulas S-ron Lentaigne, kiu partoprenas la monatajn kunvenojn kun granda intereso .

Antaŭ la tagmanĝo JB diris fabelon kaj poemon kiel kutime, tre amuzajn .

La 12an de junio ankaŭ ĉeestis 16 personoj, senkulpiĝis 5 . Ni ekpreparis la asocian tagon de la 12a de septembro . Ni devas pripensi afiŝojn, dokumentojn, banderolojn,ktp . Ĉiuj samideanoj, kiuj uzas la reton, estas petataj indiki sian retadreson al Annick Tora . Ŝi partoprenis la kongreson de La Roque d'Anthéron, ankaŭ vizitis ĝin Christian kaj Hélène ; ĉiuj estis tre kontentaj . Dum la tagmanĝo ni esprimis niajn bondezirojn al nia amiko Leo Lentaigne, okaze de lia 95a datreveno . Pluraj legis poemojn. Iu alportis belegan kaj bonegan kukon ...

Datoj notindaj por septembro :

12/9 : Forumo de Asocioj en Montpellier 19/9 : Forumo de Asocioj en Lunel

25/9 : posttagmeze, malfermataj pordoj en la kulturdomo de Lunel (E°-budo)


Venontaj kunvenoj en L'Escoutaire :

4a de septembro, 16a de oktobro, 6a de novembro, 4a de decembro (Zamenhofa tago) .

Bonajn somerferiojn al ĉiuj geamikoj !

La sekretario Rosa Aumeunier .

Ĉi-poste la grupanoj ĉirkaŭ Leo Lentaigne okaze de lia datreveno kaj gelernantoj de la kolegio Ste Thérèse en Lunel kun ilia instruistino .



PIRENEOJ : P kiel Perpignan, Prades, Porta, ktP

Les vœux des espérantistes

LA GARE. La presse nationale "Espéranto France" signale que René Llech-Walter a fêté le 30 mars ses 98 ans et lui adresse ses meilleurs compliments pour 83 années passées au service des langues régionales et de la langue internationale auxiliaire espéranto.

R. Llech-Walter fut, de 1957 à 1967, président d'espéranto France à Paris, de même que président de la Fédération Languedoc-Roussillon et membre du comité directeur de l'Association universelle de l'espéranto à Rotterdam (Pays Bas).

Les membres du Centre culturel pour l'espéranto de Perpignan se joignent à tous les espérantistes pour présenter leurs vœux les plus sincères à leur doyen.

Les cours d'espéranto sont toujours assurés, toutes les semaines, le mardi de 15 h à 16 h et le samedi de 9 h 30 à 10 h 30 au siège des Sociétés catalanes, 72, av. du Général-de-Gaulle, à Perpignan.

« L'Indépendant » 31-03-04

Renkontiĝo en Porta

Okazis dum la 1a kaj la 2a de majo la "printempa lerna renkontiĝo", organizita en Porta de KEA.

Ni kutimas skribi en la raportoj, ke tiaj renkontiĝoj ĝuis "agrablan kaj amikan etoson". Mi skribas ĉi-foje: juna kaj refreŝiga etoso, ĉar el la dudek partoprenintoj, multaj estis freŝbakitaj esperantistoj. Post agraba pikniko ĉe la lago de Puigcerdà, ni iris al la gastejo, kie fajna pluveto kunigis nin senbadaŭre por paroligaj kaj amuzaj ludoj. La prezento de tutmondaj esperantaj revuoj tre interesis la atenteman aron. La verkisto Abel Montagut klare kaj riĉe prelegis pri esperanta literaturo, malfermante antaŭ ni vojojn al la feliĉeco de horoj de legado, provizitaj danke la libroservoj de KEA kaj de Karles Berga.

La babiladojn vigligis la komuna vespermanĝo, kaj la fajro, kiu kunigis nin dum la malfrua vespero, naskigis kantojn. Frue vekitaj, post abunda matenmanĝo, ni piediris al la ruinŝtonoj de la kastelo de Porta, sub printempa suno ludante kun la nuboj. Marfiŝaĵo, neatendita en tiuj montaroj sed tre bonguste preparita, atendis nin por la lasta tagmanĝo. Trinkinte kafon, ĉiuj forflugis kvazaŭ hirundoj.

Fruktedona por ĉiuj estis tiu renkontiĝo, precipe ĉar ni preskaŭ neniam krokodilis, kaj ĉar la temoj de la prelegoj interesis ĉiun ajn esperantiston. Agraba ĝi estis, ĉar ni ĉiuj venis celante krom lerni kaj praktiki ankaŭ babili kaj amuziĝi. Ni ripetos tiujn renkontiĝojn, ĉiel bonajn por ĉiuj.

Christian Pinard

KEA (Kataluna Esperanto Asocio) organizas alian renkonton meze de septembro (la 18an kaj 19an) proksime de Vic. Vic situas meze de la vojo inter Puigcerdà kaj Barcelono
(retpaĝo : <http://www.esperanto-ct.org>)

Forumo en Prada

Esperanto Conflent partoprenis en la unua Forumo de lokaj asocioj, kiu okazis en Prada la 8an de majo, feria tago en Nord-Katalunio. La budo prezentis informojn pri esperanto kaj proponis multajn revuojn kaj informilojn, katalun- kaj franc-lingve. Deĵoris la gelernantoj de nia grupo. La organizantoj lokis nin en la kvartalo de la "kontraŭtutmondiĝo", apud Attac, Survival, "Ne al atomenergio" k.s. kaj ĉe la katalunaj lernejoj "La Bressola". La bela montrejo por nia loka movadeto, la deko da tre interesaj kontaktoj kaj la kvar novaj gelernantoj ebligas taksu la agadon fruktedona. Refarote, do.



Budanoj en Prada kun najbaroj el lernejo "Bressola" ↑

↓ Ceret, nia jubilea kongresurbo

Kongreso en Ceret (30-31 X, 1 XI)

La preparoj por la jubilea kongreso en Ceret antaŭeniras. Al la anoncita partopreno de Aleksander Korĵenkov, eblas aldoni la konfirmon de nova gasto: la vicprezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj fama skeĉverkisto Stefan MacGill. Krome la vesperojn plenigos la ensemblo Kaj Tiel Plu, kiu prezentos sian duan diskon, kaj la Teatro Trupo de Tuluzo, kiu premiere ludos la verkon *Familia Etoso*. Bonvolu baldaŭ resendi la akompanan aliĝilon.

Aliĝilo sur paĝoj 11 kaj 12



Les espérantistes en vacances après une année bien remplie

Voici venu le temps des vacances pour les élèves du club Espéranto Conflent. Une grillade à Ria a permis à tout ce petit monde de faire un point sur les activités du club. Retour en septembre.

Les élèves du club Espéranto Conflent ont sonné l'heure de la récréation dans la joie et la convivialité.

Ils se sont donc retrouvés pour fêter cette année studieuse, bien remplie, à Ria, autour d'une grillade.

Ces élèves ont reçu leur "atesto pri konstateco" (attestation d'assiduité).

Cette saison a été particulièrement riche pour le club. Nouveaux et anciens élèves ont beaucoup travaillé pour le tourisme local en présentant sur un site Internet les villages, des dépliants d'information sur le Castell d'Arrià et

l'abbaye Saint-Michel de Cuixà et l'histoire locale. Le tout en espéranto bien entendu.

C'est en septembre que tous se retrouveront pour les cours ouverts à tous avec, en plus, le projet d'articles d'intérêt général sur la région pour enrichir l'encyclopédie libre Wikipédia.

Enfin, la rencontre avec les "samideanoj" catalans se fera à Vic, toujours en septembre.

Le club profite de ces quelques lignes pour remercier la municipalité de Ria, Robert Combes et les époux Justafre qui ont contribué à la fête de fin d'année et pour souhaiter de bonnes vacances à tous.



Les espérantistes ont partagé un moment des plus agréable à Ria.

Rememore kaj danke : REVUO « ESPERANTO » ESTAS CENTJARA

Duan fojon Kataluna Esperanto-Asocio kongresos en Rusiljono . Post Perpignan en 1989 ĉi-jare Céret akceptos la 32-an kongreson de la 30-a de oktobro ĝis la 1a de novembro, kio ne estas hazardo .

Ja en 1904 Paul Berthelot (1881-1910), pri kiu oni legu en "Enciklopedio de Esperanto", iniciatis en Céret la unuan katalunan Esperanto-Asocion, kunigantan esperantistojn de ambaŭ flankoj de Pireneoj .

Ankaŭ al li ni ŝuldas « Esperanto », kiun li poste cedis al Hector Hodler . Je la fondiĝo de UEA, en 1908, ĝi iĝis kaj plueblas ĝia oficiala organo.

Kun dato de la 18-a de junio 1905, formata kaj aspekta kiel ĵurnalo, « vendita en ĉiuj stacidomoj », la unua numero estis presita en Perpignan. La fondinto-administranto estis P. Berthelot . Ĉar li estis dungita de presisto en Céret, li mem presis la 17-18-ajn sekvajn numerojn antaŭ ol li transloĝiĝu en Genevon .

Allogita pro tiu deveno kaj la iel mistera P. Berthelot, mi scivolemis pri kio por multaj estis ne klara . Helpe de mia karmemora amiko Marcel Delcourt ni arigis ĉion, kion ni povis pri P. Berthelot ĝis kiam mi havis la eksterordinaran bonŝancon ricevi de preskaŭ centjara religiulo transskribon de paĝoj el lia notlibro el la tempo, kiam, misiisto en Brazilo, li persone konis P. Berthelot je lia lasta vivotempo en la dominikana misiejo en Amazonio. Tiu konfeso de konfesinto donis al la projektita artikolo nia ion vere ne banalan .

Mi partoprenis en la franca kongreso de esperanto en Tours, fine de marto 1975 . Ĉar mi eksciis, ke Gaston Waringhien ankaŭ probable kongresos pro tio, ke li profesoris en Tours jarojn antaŭe, mi esperis persone konatiĝi kun li tiom pli ke ni jam iom interrilatis pri P. Berthelot .

Dum la honorvino en granda salono de la urbodomo, G. Waringhien diskrete eliris de la salono por paŝi en tute apuda salono. Iom poste mi prezentis min al li kaj demandis, ĉu li bonvolus legi artikolon de M. Delcourt kaj mi, pri P. Berthelot, por la baldaŭ 70-jara revuo « Esperanto » . Post tre atenta sed senkomenta legado li verdiktis : « Tiu-ĉi artikolo meritas sian lokon en la jubilea organo de UEA » . Ĝi aperis en la junia numero de 1975 .

Dek jarojn poste estis eldonita « Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon » . Pluraj paĝoj rilatas al P. Berthelot kaj G. Waringhien recenzis la monografion en « Esperanto » de decembro 1986 .

G. Waringhien estis eminenta kunlaboranto de Itô Kanzi (=Ludovikito) por lia monumenta « iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof » -vidu la volumon « ermitoj kuncelebris la majstron » - 1992 . M. Delcourt kaj Roberto Lloancy ankaŭ signife kontribuis kaj, kadre de mia propra kunlaboro, de tempo al tempo mi rilatis kun G. Waringhien . Kara en mia memoro estas lia artikolo, « Forgesita poemo de Zamenhof », ne nur pro lia konsidero al mi, sed pro tio, ke ĝi estas la lasta, kiun li publikigis antaŭ ol li subite mortis . La koncerna artikolo aperis en « Esperanto » de januaro 1991 .

Denove, kaj por mi adiaŭe, la revuo « Esperanto » rolis en rilato inter G. Waringhien kaj mi .

Jean Amouroux

VIDPUNKTOJ pri la angla lingvo, la eŭropa baloto kaj la diverseco de metodoj :

Sekve de la intervjuo de Ges. Bernard en « Midi Libre » (SFS 168), leganto de tiu gazeto argumentis por la angla . Sekvis « rebato »...kaj ĉpaĝa persona letero, al kiu respondis samlonga argumentita letero....

■ **ESPERANTO ET ANGLAIS** - Dans un récent reportage sur l'espéranto, les sympathiques enseignants de cette langue internationale oublient de la définir clairement : une sorte de latin à la simplicité rigoureusement codifiée, avec quelques racines des pays nordiques pour que leurs habitants les reconnaissent au passage. Cette langue, régulièrement qualifiée d'"internationale" n'est adaptée qu'à une poignée de pays d'Europe.

La présence anglaise s'est manifestée dans le monde entier. Il en reste forcément quelque chose. Ma participation à des congrès internationaux m'a convaincu que la véritable langue internationale, c'est l'anglais sans accent, c'est-à-dire tel que peut l'apprendre un individu qui n'est pas né en Angleterre. L'accent anglais est, lui, impraticable. Aux anglophones à s'adapter ! Avec l'élargissement de l'Europe, il faudra bien cesser d'utiliser des tonnes de papier pour un communiqué de quatre lignes et je ne vois pas tous les acteurs des instances européennes apprendre l'espéranto.

Par ailleurs, si on souhaite créer un langage universel, il faut qu'il soit accessible à tous. Comme ce sont les Chinois qui sont, de loin, les plus nombreux, pourquoi les espérantistes ne proposent pas un langage à base d'idéogrammes (simplifiés) avec la prononciation correspondante, toujours très courte ? (...)

Jacques **BARON** (Saint-Clément-de-Rivière)

■ **ANGLAIS ET ESPÉRANTO** - Dans *Votre avis* de lundi, un de vos lecteurs s'en prend à l'espéranto. Il écrit quelques contrevérités auxquelles je souhaiterais répondre. Selon lui, il s'agit d'« une langue internationale seulement adaptée à une poignée de pays d'Europe ». L'espéranto a des locuteurs dans 120 pays sur 5 continents. Le congrès de cette année se déroule à Pékin et il aura lieu au Japon en 2007. L'espéranto s'écrit aussi dans d'autres alphabets phonétiques, comme le russe.

Il prétend encore : « Une langue non définie clairement ». Le Dr Zamenhof a jeté des bases très claires en 1887, à partir des racines internationales (aux deux tiers latines). Une racine apprise égale dix mots connus ; une lettre égale un son : la langue est accessible à tous.

Par ailleurs, il propose l'anglais sans accent comme langue internationale. Lors des conférences, les anglophones comprennent mal les non-anglophones et inversement. Lors du congrès de 98 à Montpellier, 70 nationalités étaient représentées et tout le monde se comprenait parfaitement.

Par ailleurs, dans l'Union européenne, l'espéranto comme langue pivot ou langue pont est tout à fait possible et éviterait, soit de s'en remettre aux langues dominantes (...) où l'une finira par éliminer toutes les autres, soit d'avoir recours à 420 combinaisons après l'élargissement. Actuellement, 30 % à 50 % des députés européens comprennent les documents en anglais et les traductions représentent un coût d'un milliard d'euros. Il y a bien problème. (...)

Jean **HÉNIN** (La Canourgue)

Ŝajnas, ke esperantistoj foje estas tre (tro) kritikemaj de la angla lingvo . Esperantisto skribis al ML, ke la angla reprezentas malgrandegan proporcion (« infime proportion ») de l'homaro . Kio pri esperanto en tiu kazo ? Ni prientenu bumerangajn argumentojn ! Same mirige estas la titolo de artikolo pri la sudokcidenta listo de EDE : « ne al la angla ! » Kompreneble, ne al la hegemonio de la angla sed estas alia afero. Dependigi la instruadon de la angla de samtempa instruado de la esperanta estas simple utopia . En la ĉpaĝa prezento de la « okcidenta listo », la angla ne estas menciata , nur subkomprenata, kaj la dua kandidato estas agregaciulino pri la angla lingvo .

Pri la instruado de tiu lingvo, la Ministerio pri Edukado konkludas, sekve de raporto, ke la nivelo de 16jaruloj draste malaltiĝis en la 8 lastaj jaroj . Kompreneble kulpas la geinstruistoj, la lingvo mem ne prezentas malfacilaĵojn !

Libro, kiu furoras nun en Britio, titoliĝas : « (Panda) eats shoots and leaves », kiu sen interpunkcio signifas « pando manĝas ŝosojn kaj foliojn » kaj kun interpunkcio « pando manĝas, pafas kaj foriras ». Tiu pamfleto pri gramatiko ne sufiĉos por kontraŭbatali la difektiĝon de nefacila lingvo, kiu ne taŭgas kiel eŭropa lingvo .

Por la kampanjo pri la eŭropa baloto, Claude Piron donis kelkajn konsilojn koncerne la mension de la angla okaze de diskuto . Ni relegu ilin antaŭ niaj aŭtunaj forumoj .

Oni evitu esti agresemaj rilate la anglan . Eblas pritrakti la temon tute trankvile, rapide prezentante tri ideojn : 1) « L'anglais donne un avantage aux anglophones, c'est injuste, en revanche, l'espéranto, lui, met tout le monde sur le même pied » . 2) « En Europe, 94% de la population sont incapables de comprendre correctement un spécimen d'anglais courant » . 3) L'anglais est peu adapté à l'usage international, du fait de sa prononciation, de son orthographe, de sa grammaire floue, de son imprécision et du fait que le sens de ses mots s'écarte souvent de l'usage international (Par exemple « eventual » veut dire « final », alors que dans toute l'Europe continentale le mot existe dans le sens d'« éventuel ») . Atentu ! Ne enkonduku tiun 3an punkton, se vi ne havas pretajn ekzemplojn . Estas tre embarase ne povi pruvi aserton, kiun oni ĵus faris, se la intervjuanto ĝin kontestas . Ne forgesu, ke multaj personoj imagas, ke ili perfekte regas la anglan kaj tre fieras pri tio . Oni ne esprimu sin malestime por homoj, kiuj defendas la anglan . Oni nur montru, ke Eo estas supera, ĉar pli facila (vi povas diri : « à âge égal et à nombre égal d'heures hebdomadaires, les élèves atteignent en espéranto en six mois une capacité de communication qu'ils n'ont en anglais qu'au bout de six ans ») .

La listo EDE « Eŭropo, Demokratio, Esperanto » rikoltis entute 25259 voĉojn , averaĝe 0,15% de la voĉdonintoj . Plej multajn ricevis la pariza listo (5789), la orienta (5336), la okcidenta (4926) . La 5 aliaj regionoj dividas 9208 voĉojn, la sudokcidenta regiono (la nia) ricevas 3687 voĉojn, ktp . Estis ampleksa laboro por starigi listojn, sekvi la oficialajn regulojn, konatigi la kialon de la listo, pretigi kaj glui afiŝojn, presigi dokumentojn, ktp, sen grandaj monrimedoj . Dediĉo da tempo, energio, mono . Misio plenumita, se temas pri konigo de esperanto . Miloj da

« Non à l'anglais »

● **Mais l'anglais s'impose aujourd'hui comme la langue internationale ?**

► Nous ne sommes pas des rêveurs. Nous ne refusons pas l'apprentissage de l'anglais mais nous voulons qu'il soit accompagné de l'espéranto. Trouvez-vous normal que l'Europe adopte la langue du pays le moins européen ? Aujourd'hui, à Bruxelles, il existe une véritable discrimination contre les autres langues.

homoj spektis televid-filmetojn, aŭdis mallongajn radio-elsendojn pri esperanto. Bonege! Sed, kun malalta elcentaĵo, eĉ se ĝi estus la dekoblo, la ŝancoj havi elektiton estas nulaj. Estas troigo aserti (vidu dekstre), ke politikistoj neniam atentis esperanton. Triono da niaj deputitoj ekzemple faris lastjare skribajn demandojn al la ministro pri edukado (demandoj kaj respondoj aperis en J.O.), pri E^o oni diskutis antaŭ nelonge en la nacia asembleo kaj la eŭropa parlamento. Sur la programo de G. Onesta, listestro de la Verduloj en nia regiono kaj eks-prezidanto de la eŭropa parlamento, oni povas legi la decidon « subteni la lernadon de lingvoj, speciale de minorigitaj lingvoj (« minorées ») kaj de esperanto », la teksto en esperanto de la programo estas ankaŭ legebla rete. Ĉu la iniciato de E-listo ne fuŝos la rilatojn kun iuj partioj? Ĉu en venontaj klopodoj oni ne respondos: « vi reprezentas nenion! »? Ĉiu konsciu pri la du flankoj de la monero, la hela kaj la malpli hela. En Pollando, kadre de partio, estis elektita Malgorzata (Margareta) Handzlik. Ŝi estas bonega esperantistino kaj la edzino de Georgo Handzlik, « la bardo sen barbo », ankaŭ presisto kaj verkisto. Ŝi partoprenis la UK de Montpellier. Ŝi certe sukcesos progresigi la ideon pri E^o (ankaŭ en sia grupo EPP, de kie venis opono al la amendo Dell'Alba)...se ŝi estos akceptata en la komisionon pri kulturo.

Demandita pri EDE, Renato Corsetti, prezidanto de UEA respondis: « Mi mem pensas, ke ilia agado estas bona, kiel ĉiu agado por Esperanto. Ankaŭ bona estas la agado de UFE, kiu provas iri tra la ekzistantaj partioj. Same bona estas la agado de tiuj esperantistoj, kiuj nek kontaktas la partiojn, nek prezentiĝas al la elektoj, sed instruas Esperanton al la homoj, kiuj interesiĝas pri ĝi sekve de la agado de EDE aŭ de UFE. Sen tio ni neniam progresus. Temas nur pri tio, laŭ mi, ke oni ne devas absolutigi la valoron de difinitaj agadoj. Ĉiuj estas bonaj kaj ĉiuj kune efikas. Eble mi mem estas tro maljuna por havi firmegeajn certecojn, sed en la vivo ĉiam temas pri ekvilibro kaj kunlaboro ».

Dume EDE havas planojn por prepari la elektojn de 2007 (deputitoj kaj prezidento). EDE-anoj ne malatentu tion, kion faras aliaj esperantistoj. Ĉu la freŝdata decido okazigi kunvenon en Greziljono samdate kiel la baldaŭa Eŭropunia-kongreso en Bilbao, anoncita de du jaroj, estas plej oportuna? Kunlaborado eblas nur kun bonvolemluloj. Espereble esperantistoj retrovos sin en Boulogne sur Mer por la centjariĝo de la unua UK de E^o. Se vi intencas partopreni, ne tro prokrastu, ĉar la nombro da lokoj por la kongresejo kaj la loĝeblecoj estas limigita. Petu eventuale aliĝilon de SFS aŭ aliĝu rete: www.boulogne2005.com

JH



Mamy wspólnie marzenia...



INTERNACIA AMIKECA ESPERANTO-RENKONTIĜO
CENTJARIĜO DE LA UNUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Organizita de la Nordfrancia Esperanto-Federacio (Espéranto-Nord)
En Bulonjo-ĉe-Mar (Nordfrancio) Dum la Paskaj Festoj de 2005
De vendredo la 25^a ĝis merkredo la 30^a de marto 2005

Temo: « *Esperanto: perspektivoj post 100 jaroj de renkontiĝoj* »

60^a KONGRESO DE SAT-AMIKARO
NACIA INTERASOCIA KONGRESO DE ESPÉRANTO-FRANCE
56^a KONGRESO DE LA FRANCAJ ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ
MARKOLA KONGRESO (NORDFRANCIO-ANGLIO-BELGIO)

INTERASOCIA KONGRESO EN LA ROQUE D'ANTHERON

Pli ol 100 personoj partoprenis tiun kongreson, inter kiuj 7 federacianoj kaj kromaj du, kiuj vizitis rapide. Estas ĉiam agrable revidi malnovajn geamikojn kaj konatiĝi kun novaj gesamideanoj. Kompreneble ne mankis laborkunsidoj, nova komitato estis elektita, federacioj kunvenis aparte por plibonigi siajn reciprokajn kontaktojn. Inter aliaj ni notis la baldaŭan eldonon de informbroŝuro kaj de novaj paneloj por ekspozicioj. La prelego pri la Valdanoj ege interesis, despli ke sekvis enurbe vizito de samtema muzeo. La distraj vesperoj estis variaj kaj allogaj: folkloro provenca grupo, Jomo, talentuloj kun Ĵak Le Puil sed eble plej plaĉis la teatra vespero kun « Espéranto, utopie ou réalité » pro ties realisma karaktero. Kaj kompreneble ĉiuj ĝuis la ekskursojn al la proksimaj urboj Marseille, kun ŝipveturado al la insulo If kaj ĝia fortikaĵo, kaj al Aix en Provence, la urbo de la cent fontanoj. Kaj ne forgesindas interesa ekspozicio en la turismoficejo pri E^o. En 2005 ni kongresos en tute alia regiono kaj, pro la ĉeesto de eksterlandanoj, valoros partopreni.

Verdaj anekdotoj :

Blanka pulvoro .

Karaj geamikoj, ĉu vi ŝatas « lukumojn » ? Eĉ se ne, mi opinias, ke tiu rakonto interesos vin . La 20an de aprilo mi alvenis en Bouresse por partopreni en du staĝoj . La etoso ŝajnis al mi nekutima. Sciante la kialon, vi bone komprenos . London, sufiĉe malfrue, 4 geesperantistoj el Arras eltrajniĝis en Poitiers . Unu el ili, blindulo, necesigis la helpon de Edmond Plutniak . Plie Edmond ankaŭ zorgis pri unu el la tri valizoj. Lia edzino Arlette zorgis pri la du aliaj . Ĉiuj alvenis en « Kvinpetalo », la staĝejo, vespermanĝis kaj iris en siajn dormoĉambrojn . Arlette Plutniak konsterniĝis, vidante, ke la valizo pri kiu zorgis ŝia edzo ne estis la ŝia . Sed, elĉerpita pro la longa vojaĝo, ŝi prokrastis la klarigon ĝis la morgaŭo . Matene ŝi do malfermis la valizon ; strangaj aferoj kuŝis en ĝi, notlibreto en kiu ŝi rekonis arabajn literojn . Apud ĝi kuŝis ankaŭ plasta sako, kiu entenis skatolon, kie ŝi povis legi « Bagdad-Iran » . Ian blankan pulvoron ellasis la plasta sako . Arlette pensis pri terorista afero, kaj tuj ŝi fermis la valizon kaj singardeme, lasis ĝin meze de la korto . Kiam Suzanne Bourot, la estrino de la staĝejo, informiĝis, ŝi senatende telefonis al la policoficejo . Rapidege alvenis policistoj, multope, kaj ankaŭ fajrobrigado , iom pli poste alvenis scienca brigado. En la daŭro de fulmo, la policistoj vakigis « Kvinpetalo »-n kaj limigis la lokon per sekurkordono . Ĉiu policisto kaj fajrosoldato surhavis kontraŭpoluajn maskojn . Tre afablaj najbaroj gastigis la staĝanojn, kaj la urbestro disdonis manĝeton kaj varman kafon por rekuraĝigi ĉiujn .

Post kelkaj horoj, la scienculoj anoncis, ke la suspekta skatolo enhavis nur... «lukumojn» sukerumitajn . Uf ! Neniu kemia infektado minacas « Kvinpetalo »-n !

...Sed kio okazis pri la valizo de Arlette ? Kie ĝi estis ?

La policistoj telefonis al la staciestro de Bordojo, kie virino plendadis pro la malapero de sia valizo . Feliĉe, ŝi ne lasis en la trajno la lastan valizon . En tiu kazo, certe oni estus eksplo-diginta ĝin ! Edmond do trajniris ĝis Bordojo, kie la interŝanĝo de valizoj okazis sub polica kontrolo .

Kia afero, ĉu ne ? Ĵurnalistoj venis al «Kvinpetalo» por intervjui la staĝanojn, artikolo aperis en gazeto kun bildo kaj sub la titolo «Psikozo» ! «Kvinpetalo» por staĝoj kaj aventuro !

Dankon al Josée Boccadifuoco pro la raporto . Ŝi profitis la restadon por sukcese trapasi la pedagogian parton de la «Kapableco» kaj ni gratulas ŝin .

Daŭra fajfado :

Post la lasta federacia kunveno en Narbonne mi revenis kun la konata « elektronika panelo », kun la celo uzi ĝin dum iu forumo en junio, por montri kiel esperanto estas simpla .

La sekvantan matenon ekfajfis en la enirejo de nia domo . Ni ne komprenis de kie venis tiu sentinterompa kaj ĝena bruo . Ni suspektis la sonorileton (temas pri aparato kun trideko da elekteblaj arioj), kontrolis laŭpove sed nenio ŝanĝiĝis... Ni alvokis elektrikiston, kiu venis nur vespere. Li ankaŭ serĉis kelkminute la kialon de tiu daŭra bruo kaj preskaŭ rezignis . Finfine li petis nin malŝalti la elektron kaj fermi la akvan cirkvitojn . La bruo ne ĉesis...

Perpleksa, li demandis, ĉu hazarde iu aparato en la domo funkcias pere de baterio . Post pripensado ni trovis, ke estis nova gasto en la domo : la « elektronika panelo » . Ĝi estis la kulpanto ! La lasta uzinto ne formetis la baterion kaj kontakto inter la metalaj stangetoj, kiuj utilas por montri respondojn, ekfunkciigis la sistemon .

Niaj timpanoj iom suferis dum tuta tago ; estontaj uzantoj de la « elektronika panelo », bonvolu ne forgesi forpreni la baterion !

J. H.

EDE :

Ĉu vi ne aŭdis pri EDE », la poresperanta listo en Francio dum la eŭropa baloto ? Bonvolemulo disdonis prospektojn pri ĝi sur parkejo de grandvendejo aŭ metis ilin sub la glacoviŝilojn . Aŭtomobilisto, svigante la prospekton, aliris nian samideanon kaj amare plendis, ke oni konstante ĝenas lin kaj ke « sufiĉas kaj tedas tiuj perturboj » . Sekvis momenteto de nekomprene . Nia samideano provis klarigi, ke li tute ne intencas ĝeni sed informi pri la lingvoproblemo . La plendanto kontrolis tiam kaj malkovris, ke temas pri « EDE » kaj ne pri « EDF », kies dungitoj tiam strikis kaj foje malŝaltis elektron...

La konkludo de tiuj tri anekdotoj estas la titolo de libro. Ĉu vi trovas ĝin ?

Respondo : « Esperanto, la danĝera lingvo »



La cirkle mobile d'intervention chimique des policiers de la Vienne s'équipe pour approcher les lieux

Fajrobrigado de la departemento Vienne, speciale ekipita por kemia interveno, alproksimiĝas...

MENDILO

Kongres- tagoj	Junulara restadejo
sabate	_____
dimanĉe	_____
lunde	_____
	(BANKEDO)
ANTICIPE PAGENDAJ	
Kotizo laŭ kategorio <input type="checkbox"/>	en periodo <input type="checkbox"/>
eŭroj
• Rezerva 20% anticipa pago por restadejo, kaj bankedo (deprenebla de la surloke pagota totalo) "
• Donaco por la Kongreso "
• Entute mi sendas per la ebleco X-signita ĉi-sube <u>eŭrojn</u>

per trastrekita ĉeko nome de Kataluna Esperanto-Asocio

per poŝtĉiro nome de nia Asocio

per bankmandato rekte al la konto de nia Asocio en "La Caixa" 2100-0461-90-0200055053

Sendu ĉi tiun aliĝilon kaj samtempan kotizon al :

KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
Apartat 1008 – 08200 SABADELL
Tel. 93 710 96 36 Fakso 93 716 36 33
Retadreso: kea-kasisto@esperanto-ct.org
TTT-paĝo: www.esperanto-ct.org

Kunlaboras:



Generalitat de Catalunya
Departament de Cultura



KOTIZTABELO

KATEGORIO	periodo 1 ĝis 31.07	periodo 2 ĝis 30.09	poste	tage
A. Kongresano membro de KEA, de ties aliĝintaj Grupoj aŭ de Transpirenaj Federacioj	26,00	30,00	34,00	13,00
B. Familianoj A, gejunuloj membroj de KEJ aŭ plenaĝaj ekster- landanoj el Eŭropa Unio 15	14,00	16,00	20,00	8,00
C. Kongresano ne membro de la Asocioj sub A	32,00	36,00	40,00	13,00
D. Familianoj C	17,00	21,00	25,00	9,00
E. Infanoj ĝis 12 jaroj kaj aliaj	senpage			

Rilate kotizojn, la valida aliĝdato estas tiu de la poŝta stampo. La aliĝilo validas nur kiam la kotizo estas enspezata. La kotizo ne estas repagebla okaze de ne partopreno. Membroj de la Transpirenaj Federacioj kaj eksterlandanoj rajtas pagi surloke ĉe la alveno.

Tranoktado

1. Kun la konfirmilo vi ricevos hotel-liston kun prezaro (diversaj kategorioj de 30 € ĝis 200).

2. Kongresanoj rajtos tranokti en la liceo Beausoleil. Matenmanĝo: 1,5 €; tagmanĝo: 9 €; vespermanĝo: 7 €; tranokto: 7 €.

Bankedo.

Okazos en la restoracio Table Cérétane, proksime de la Diablo-ponto
Prezo: 20 €.

32a KATALUNA KAJ 5a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

30a, 31a OKTOBRO
1a NOVEMBRO 2004

CERET (Vallespir)

Cent jaroj da Esperanto en Katalunio



Auguste Herbin: Pejzaĝo de Ceret, 1913, olepentraĵo sur tolo, 94 x 91,5 cm

CERET

Ceret, ĉefurbo de Vallespir, kolektas ĉ. 8000 loĝantojn. Ĝi posedas rimarkindajn mezepokajn konstruaĵojn, el kiuj plej elstaras la Diablo-ponto (14a jc). Menciindas ankaŭ la restaĵoj de la mezepokaj urbopordoj (12a-13a jc) kaj la fontano de la Naŭ Ŝprucoj (14a jc).

Tamen, el arta vidpunkto, Ceret plej brilas en la komenco de la 20a jc danke al la enloĝiĝo de la skulptisto Manolo Hugué kaj la komponisto Deodat de Severac. Post ili ekloĝis por kelka tempo Picasso, Braque, Gris, Max Jacob k.a. dum la komencaj jaroj de la kubisma periodo, kiu fakte vartiĝis en la urbo. Ĉi tiu grupo disiĝis pro la unua mondmilito, tamen baldaŭ estis anstataŭita de alia kun Brune, Soutine, Masson, Lotreuil k.a.

Pierre Brune kreis la urban juvelon, la Muzeon pri Moderna Arto, surbaze de verkoj de la elstaregaj artistoj loĝintaj aŭ en Ceret aŭ en apuda vilaĝoj, kiel Chagall, Gargallo, Sunyer, Cocteau, Artigues kaj Tàpies.

Krome, Ceret estas aparte grava por la katalunaj esperantistoj, ĉar tie Paul Berthelot –la posta fondinto de la revuo *Esperanto*– kreis en 1904 la unuan katalunan Esperanto-asocion, kiu kunigis zamenhofanojn el ambaŭ flankoj de Pireneoj. Ankaŭ en Ceret li eldonis la tri numerojn de *Espero de Katalunjo*, la asocia organo.

Nia kongreso festos tiun centjaran jubileon de la kataluna movado kaj profitos la okazon por denove kongresi en Nord-Katalunio, dek kvin jarojn post Perpinjano.

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 30.10.04

- 11:00 Malfermo de la kongresejo kaj disdono de dokumentoj.
[Matene okazas foiro en la urbo]
12:00 Solena oficiala inaŭguro en la Urbodomo kun la aŭtoritatuloj.
13:00 Tagmanĝo
15:00 Prezento de la jubilea broŝuro (F. Poblet)
16:30 Prelego
18:00 Prelego
19:30 Vespermanĝo
22:00 Arta Vespero: Kaj Tiel Plu prezentos sian novan diskon

Dimanĉon 31.10.04

- 10:00 Kunveno de la kunorganizantaj asocioj
11:00 Prelego
12:30 Tagmanĝo
15:00 Instruista ateliero (gvidos: Stefan McGill)
16:30 Prelego
18:00 Prelego
19:30 Vespermanĝo
22:00 Arta Vespero: Teatro-Trupo de Tuluzo premiere prezentos la verkon "Familia Etoso".

Lundon 01.11.04

- 10:00 Literatura Mateno (Prelegos: Aleksander Korženkov)
12:00 Verdikto de la 3a Premio Delfi Dalmau
13:00 Adiaŭa bankedo

Kongresejo: "La Unió", bulvarde La Fayette

Kongrestemo: "Novaj kulturaj defioj"

Libroservo: Ĝi funkcios la tutan Kongreson

ALIĜILO

Antaŭnomo(j).....
Familia(j) nomo(j)
.....
Adreso.....
.....
.....
Urbo.....
Komarko.....
Naskiĝdato.....
Profesio.....
KEA-ano n-ro..... kotizinta por 2004
Aliĝdato..... Subskribo.....

Bonvolu skribi tajpe aŭ preslitere.

Nepre legu kaj plenigu la dorsan parton antaŭ ol sendi la aliĝilon.

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon. Se vi bezonas pliajn, mendu ilin aŭ simple fotokopiu ambaŭflanke ĉi tiun.

Rezervita por administra uzo

Kongresnumero	KEA-kotizo ricevita	Kongreskotizo ricevita
Aliĝilo ricevita	Konfirmilo sendita	Rimarkoj

KONCIZE / En deux mots● **Novaj teknikoj**

Post ITV, televidkanalo en E (SFS 168), "Skype", senpaga bonkvalita telefono en la interreto . Post instalado de la softvaro (elŝutebla ĉe : <http://www.skype.com>) oni povas senpage voki al la tuta mondo . Pluraj centoj da esperantistoj jam uzas la sistemon : <http://groups.yahoo.com/groups/skajpanoj>

● **Katalogo de Vinilkosmo (31450 Donneville)**

<http://www.vinilkosmo.com> Ĝi pliriĉiĝas konstante, laste aperis la KD (kompaktdisko) « Civilizacio » de Strika Tango el Argentino kaj « Ondumas tra la mond ' » , 2a albumo de la bretona koruso Meven . Baldaŭ aperos « Hotel Desperado », dua albumo de E^o-Desperado (Danio), « Mi estas », unua KD de Ĵak le Puil kaj « Plaĉas al mi », dua albumo de Kaj Tiel Plu (Barcelono). Gratulojn al Flo pro lia senlaca laboro !

● **Radioj en esperanto :**

E^o estas ankaŭ parolata lingvo . Ĉiuj informoj pri radioj en E , frekvencoj, horaroj, ligiloj, retadreso, sonarkivoj, ktp, estas troveblaj ĉe <<http://www.radioarkivo.org>> . Aŭskulti radion estas bona maniero por lerni E-on kaj samtempe por informiĝi pri Esperantio .

● **Leginda kaj rekomendinda :**

« Atlas des langues du monde », aŭtoro Roland Breton, eldonejo Autrement, kolekto « Atlas/ Monde », prezo 15^e . Ĝi detale priskribas la mondon de la lingvoj . Nura bedaŭro, la diagramoj estas foje malgrandaj . Tiu atlaseto mencias esperanton kun la rimarko, ke oni taksas, ke estas 500 000 aktivaj uzantoj de la lingvo kaj 8 milionoj, kiuj konas ĝin .

● **Interesa kaj...rebatinda :**

« Science et Vie » n^o 227 (Hors Série) kun la titolo « Du langage aux langues » klarigas kiel cerbo produktas parolon, kiel infano progresas en parolado, de kie venas la lingvoj de la mondo, ktp . Artikoleto pri universala lingvo konkludas tiele : « la langue universelle, désincarnée, n'appartenant à aucun individu ou groupe, n'est justement pas une langue » . Neniu mencio fakte pri esperanto !

● **Nekutima vojaĝanto (lasta SFS p.12)**

Yoichi, nia japana amiko, sendis poŝtkarton el Slovakio kun la jena teksto : « Saluton, kiel vi fartas ? Post restado ĉe vi, mi vizitis la nacian muzeon pri E^o en Gray kaj E^o bibliotekon en La Chaux de Fonds (Svislando) kaj en Aŭstrio mi vizitis « E^o-muzeo »-n . Ĝi situas ĉe la centro de Wien (nekredeble en Palaco !) . Feliĉe oficisto parolas esperante, do mi povis ĝui babiladon . Nun mi estas en Slovakio . Hodiaŭ mi aĉetis ŝuojn, jakon

ŝtrumpetojn, subĉemizon. Orienta Eŭropo estas afabla por mia monujo . Mi esperas, ke via E^o-mondo estu sukcesplena . Fartu bone ! »

● **En la konsilantaro de Eŭropo...**

Sro J-C. Trichet, direktoro de la Eŭropa banko kaj de franca deveno, havis surprizon, kiam, komencinte sian prelegon en la angla, pluraj francaj reprezentantoj forlasis por protesti kontraŭ la uzo de la angla . Poste, li daŭrigis en la franca, unu el la oficialaj lingvoj . Bone, kiam francaj elektitoj defendas la francan lingvon ! En Majo, okaze de « Bunto » en Strasburgo, pli ol 300 personoj, ĉefe esperantistoj, manifestaciis por defendi la lingvo-diversecon en Eŭropo .

● «**Europa bulteno** » estas monata suplemento de « La Ondo de Esperanto », papera revuo abonebla . Retaj versioj de « La Ondo » kaj de « Europa Bulteno » estas elŝuteblaj ĉe <http://Esperanto.Org/Ondo>

● **E^o-kluboj sur internacia mapo :**

Dank'al Esperantoland oni povas facile trovi en kiuj urboj estas E^o-grupoj . Ankaŭ eblas aldoni vian grupon, se ĝi ankoraŭ ne estas sur la mapo . Vidu : <http://www.esperantoland.org/grupoj/>, alklaku « Eŭropo »-n kaj poste « Francio »-n . Certe en ĉiu grupo estas sperta retuzanto por aldoni vian grupon .

● **Kursoj kaj staĝoj de esperanto :**

Esperanto-France pretigas nun la ĉiujaran liston de la ekzistantaj kursoj kaj staĝoj en Francio . Gravas por informado de esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kiuj serĉas kurson aŭ staĝon . Ne forgesu kompletigi la slipon kaj ĝin resendi . Eventuale petu kopion de SFS .

Samideanoj forlasis nin .

Forpasis Roger Colney, UEA-delegito en Gap, fidele leganto de SFS kaj ankaŭ kontribuanto . Ni kondolencas al liaj familianoj .


Ankaŭ forlasis nin Georges Lagrange, konata esperantisto . Li estis Akademiano, skribis romanojn, tradukis teatraĵojn, adaptis kanzonojn, tradukis en E-on la biografion de Zamenhof (de Masson-Centassi) kaj estis unu el la du motoroj de la staĝejo Kvinpetalo en Bouresse . Ni kondolencas al liaj filoj Arno kaj Patrick .

● **Universala Kongreso en Pekino :**

Ĝi kunigis pli ol 2000 esperantistojn . Pli ol la duono estis ĉinaj . Renato Corsetti estis reelektita prezidanto de UEA . Claude Nourmont estis elektita vicprezidantino (kulturo, kongresoj) . Gratulojn .

● ● ●

KRUCVORTOJ



HORIZONTALALE

- I) - Marmapa lini(o).
- II) - Privilegiul(o).
- III) - Ŝipa ŝtip(o) / Malbela fabelul(o) / Meze de boat(o).
- IV) - Logik(e) post la unua / Inferul(o).
- V) - Rilate kavesploradon.
- VI) - Televidul(o).
- VII) - Ĉina princip(o) / Emoci(o) / Fortomontro.
- VIII) - s : Fakisto / Muzikilo.
- IX) - Duonvoj(o) / Propre don(i).
- X) - Vivodetruil(o) / Pet(i).

VERTIKALE

- 1) - Esplorej(o).
- 2) - Unua ec(o).
- 3) - Artikula tegaĵo / Angla kanto.
- 4) - Senkora SOS / Ŝuld(oj).
- 5) - Medicina radiko / Mara monstro.
- 6) - Novhelene arti.
- 7) - s : Franca stilo / Verba finaĵo / Granda vaz(o).
- 8) - s : Metallo / Deziresprimil(o).
- 9) - Aŭstrala gent(o) / Bongusta riverfiŝ(o).
- 10) - Uliso / Verba sufikso.

s : sone

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	F	A	K	T	O	R	I	A	L	O
II	A	N	T	I	T	O	K	S	I	N
III	M	A	N	G	O	S	T	A	N	O
IV	i	L		R	M		E	D	O	M
V	L	E	D		A	P	R	I	L	A
VI	i	P		H	N	R		L	A	S
VII	A	T	B	E		E		N	T	T
VIII	R	I	O	N	E	G	R		O	I
IX	E	K	V	I	L	I	B	R		K
X	C	O	L		A	L	T	A	R	O

Solvej de la 134-a

Proverboj : Kompletigu !

- Bona vino / al la
- Aperas prudento, / kiam pasis la
- Batu malbonulon, li vin flatos ; / kisu lin, li vin
- Perdiĝas per prudentono / amiko kaj
- Bono farita / ne estos
- Kiun prudenton ne havas, / tiun saĝo ne
- Ne batalu pot' el tero / kontraŭ kaldrono el

Solvej : fino, momento, batos, mono, perdita, savas, tero

ANEKDOTOJ

- Ho, vi trinkas mineralakvon ! Mi vidas, ke vi aktive batalas kontraŭ alkoholo...
- Jes, kontraŭ la hieraŭa !
-
- Kredu, akvo estas la plej bona trinkaĵo, asertas preleganto dum kontraŭalkohola prelego .
- Mi estas malriĉa homo kaj do ne bezonas havi ĉion plej bonan, mi kontentiĝos plu kun vino, ekvoĉas iu de malantaŭe .
-
- Filo al sia patro :
- Kial vi ne volas permesi al mi, ke mi ŝoforu . Ja mi jam estas sufiĉe aĝa por tio .
- Vi jes, sed la aŭto ankoraŭ ne !
-

Plendas amiko al amiko :

- Kiam mi venas hejmen, mia edzino ĉiam provoke ekrigardas la horloĝon .
- Tio estas nenio . Kiam mi venas malfrue hejmen, la mia komencas foliumi en la kalendaro...!

La venonta bulteno aperos komence de oktobro . Bonvolu sendi ĝustatempe, plej malfrue ĝis la 20a de septembro, viajn kontribuojn, raportojn, artikolojn, ktp . Anticipan dankon !

**Jean Hénin – Beauregard – Route de Montcayroux 48500 La Canourgue
Telefona/telekopio 04 66 32 86 36
Jean.henin@wanadoo.fr**